

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Asocia sidejo de S.A.T. kaj administrejo:

67 avenue Gambette, Paris 20
Redaktoroj: L. Bannier ĉe S.A.T., Parizo kaj Bas Wels la Wandeloorddwardsstraat 33 Rotterdam.

Eldonejo de SENNACIULO:
C. van Essen
Floretstraat 10, Rotterdam-Z.

Pri Toleremo

Dum la pasintaj militjaroj ni dolorige spertis ke ŝtato, kies sola gvidprincipo estas la potenco, ne hontas fari la plej abomenindajn krimojn kontraŭ la homo. Neglektante la rajton, ĝi tretas sur ĉiujn demokratiajn leĝojn kaj instituciojn. En tia ŝtato ne povas ekzisti toleremo.

Toleremo — kiel eco aŭ sistemo — ne malpermesas nek persekutas opiniojn — religiajn aŭ politikajn — de alipensantoj, agnoskante per tio la neceson respekti la homon koncerne liajn konvinkojn. Ŝajnas al mi ne superflue ion rakonti pri la historio de tiu multflanka problemo, ĉar per tiu kono ni sendube staros pli firme en la batalo por homaj rajtoj.

En la antikva tempo klasika regis plena libereco religia kaj ĉiu rajtis esprimi sian opinion. En Grekio ne ekzistis doktrino, ne dogma leĝaro, kaj la konvinko de alipensantoj estis plene respektata. La Grekaj kaj Romaj dioj havis — permesu al mi la esprimon — limigitan laborteron, kiu ne transiris la limojn de la ŝtato. La politeismo, estas tolerema al la adeptoj de aliaj religioj. La problemo estiĝas per la veno de la kristana religio en la Roman mondon. Unu plenpotenca, ĉion reganta dio malpermesas la kristanojn doni dian honoron al la imperiestro de Romo, kaj la kristanoj — malfidataj pri sia politika lojaleco — estas traktataj ofte tre severe kaj iam ili estas eĉ mortigataj.

Dum la regado de Konstantino la Granda la kristana religio estas agnoskata (311) kaj baldaŭ post tio ĝi fariĝas la oficiala religio de la ŝtato, kiu nun fermas la paganajn templojn kaj persekutas la adeptojn de la malnova religio.

El la batalo de la diversaj kristanaj tendencoj naskiĝas en la sekvantaj jarcentoj la katolika doktrino; kreskadis la dogmoj. Deviantaj konceptoj estas subpremataj kaj la adeptoj persekutataj kiel herezuloj.

La eklezio fariĝas la protektanto de la religia „vero”, kaj Aŭgustino formulas tute klare ke la eklezio havas la rajton kaj la devon ekstermi herezajn ideojn kaj teni la religion pura. Tiu maltoleremo kiel sistemo regis dum la tuta mezepoko. Thomas Aquinas diras pri tiu netoleremo la jenon: „Individue, en la rilatoj de homo kontraŭ homo, toleremo estas virto, sed la Eklezio postulas purecon.”

Ni ĉiuj scias, kiel la Inkvizicio, kies granda tasko rekomenciĝis dum la levi-

ĝado de la Protestantismo kiel amasmovado, faris la problemon de la toleremo unu el la plej gravaj de la dekseca jarcento. Persekutado al herezuloj, torturado, konfiskado kaj eĉ religiaj militoj vekas ĉe la homoj la interesiĝon pri la problemoj de la toleremo kaj la sopiron pri pli da libereco, precipe religia. Tamen, ni ne kredu ke la dogmema protestantismo de Luter kaj Kalvino addigis principan proteston kontraŭ religia persekutado. Tiu protesto venis de aliaj flankoj. Ĝi venis de Baptistoj, de Humanistoj, de Spiritualistoj kaj de raciismaj Renesancanoj. La starpunkto, ke ĉiu homo estas plenalvalora estulo, kies ideoj devas esti respektataj aŭ almenaŭ tolerataj daŭre pli populariĝis. Ĉio kune kristaliĝas en la kredo pri la indeco de la homo. Kiel pensanta kaj kreanta estulo li meritas respekton pri sia klopodado trovi la veron.

Nurrite per tiu democio, la 17a kaj la 18a jarcentoj montras novan aspekton. Aperas la epoko de la tolerado, en kiu la registaroj donas relativan liberon religion, kvankam tiu libereco ne bazas sin jam sur rajto; ĝi estis nur favoro. La Raciismo de la 18a jarcento, inklinante sature ĉiujn religiojn per la racio, havas multajn grandajn defendantojn de religia libereco, el kiuj mi nomas nur Voltaire kaj Bayle. Kiel ni jam atingis la grandan Francan revolucion, en kiu je la unua fojo, kaj sub influo de Amerikaj ideoj, opini-libereco — do ankaŭ la religia — iĝas rajto de ĉiu homo. Ankaŭ koncerne la politikon la toleremo grave disvastiĝas: la homo estas libera koncerne siajn ideojn pri la gvidado de la ŝtato. La evoluanta demokratia regad-sistemo fariĝas la portanto de la politika toleremo. Kaj tiel la plej profunda esenco de la demokratio troviĝas pli en ĝia toleremo, en la respekto por la personeco de ĉiu homo, ol en la plimulto-principo. Ŝtato, bazita sur rajto, agnoskas, ke la civitanoj havas rajtojn kaj liberecojn.

La naci-socialistaj despotoj frakasis ĉiun toleremon kaj precipe la politikan, kaj nuntempe la disŝirita, mizerigita kaj senluziigita mondo penadas rekonstrui sin sur la antaŭa bazo de toleremo. Tasko giganta! Ĉu la mondo per la kruelaj lecionoj spertitaj lernis ion pri toleremo? Mi opinias ke jes. La toleremo baziĝas sur reciproka etika principo. La liberon por esprimi miajn opiniojn mi postulas kiel rajton, sed mi konfesas, ke ankaŭ ĉiu alia homo havas

tiun rajton, mi do devas esti tolerema kaj respekti lin koncerne tiun rajton. Toleremo do konfesas, ke la homoj estas malsamaj, ankaŭ koncerne siajn ideojn. Se ne estus tiel, la problemo ne ekzistus. Sed se mi havas la konvinkon, ke mia raso, nacio aŭ klaso estas supera al aliaj, kaj ke nur mi konas la veron, tiam ne eblas al mi konsideri la ideojn de aliuloj egalrajtaj; tiam mi ne estos tolerema kaj ne matura por kompromiso. Ĉar la toleremo — neniam celo, sed ĉiam rimedo por garantii paceman evoluadon en la socia vivo — bazas sin sur kompromiso. Ekstremistoj, fanatikuloj kaj profetoj ne povas esti toleremaj, ĉar ili neniam respektas alies ideojn. Jen nesolvebla problemo kaj granda danĝero por la delikata planto: toleremo.

La dua danĝero kaŝiĝas en indiferenteco. Homo sen konvinko, kontraŭstarante nenion kaj nenion, kiu ĉion toleras kaj do sentas sin pri nenio respondeca, miskreditigas la toleremon per sia indiferenteco. Kaj plie estas malfacile respekti liajn ideojn, simple pro tio, ke ĉi tiuj ne ekzistas.

Sed la plej granda problemo troviĝas en la limoj de la toleremo. Ĉu oni devas esti tolerema ankaŭ kontraŭ la netoleremuloj? La falo de multaj demokratioj antaŭ kaj dum la lasta milito montris al ni, ke la toleremo esence estas malforta kaj ke ĝi tre facile povas esti renversata. Se oni do deziras konservi la toleremon tiel en la individuo kiel en la ŝtato, povas okazi, ke necesas agi maltolereme koncerne tiujn, kiuj malrespektas niajn principojn de toleremo. Ĉu oni per tio kreas iun tiranecon de la toleremo? Ne, ĉar oni ja havas rajton sin defendi, rajton batali por sia ekzisto. La humanisto ne toleras ĉian homon, sed nur tian, en kiu li vidas veran kunhomon. En sinkorektado kaj respondeco al la socio troviĝas unu el la plej belaj ecoj de la homo. Se tio forestas, la homo malleviĝas sub la nivelo, kiu devigas nin al respekto.

Legantoj, mi finu per la vortoj de Voltaire: „Estu tolerema, escepte kontraŭ netoleremuloj.” H. BONGER.

Seriozaj S.A.T.-anoj legas nian organon kun plena atento. La aliaj, la supraĵaj legantoj, kaŭzas al si mem gravan domaĝon; ili ne profitas per tio, por kio ili pagis.

Estas S.A.T. kiu senĉese agadas por la konkretigo de la nebula interna ideo: ĝi kulturas ĉe la esp-istoj universalan menson kaj klopodas fari el ili mond-civitanojn en la vera senco de la vorto.


Albert Hahn Sr.

- Argentino.** Kdo José Maria DURAN, Casilla Correa 1802, Buenos Aides 8 pes.*
- Aŭstralio.** Kdo Harry W. BUSWELL, 80 Alfred Street, Parkside, Sth. 7½ ŝil.
- Aŭstrio.** Kdo Ludwig SAGER, Maderspergerstr. 14, Wien-XVI 7 ŝil.*
- Belgio.** Kdo G. BASTEELS, 190 rue de Monténégro, Forest-Bruxelles (poŝta konto No. 252523) 80 f.b.
- Brazilio.** Kdo Roberto das NEVES, de Esp. Klubo, str., Araujo Porte Alegre 36, Rio de Janeiro 40 krz.*
- Britio.** Kdo O. MELTON, 19 Brentwood Grove, Great Barv., Birmingham-22-a 7½ ŝil.
- Bulgario.** Kdo Pantelej Stojanov GUMAKOV, str. Morava, 89, Sofio 300 lev.
- Ĉekoslovakio.** Kdo Josefo PATERA, Dvorakova 24, Pilzen 45 kĉs.
- Danio.** Kdo R. JORGENSEN, J. P. Jacobsenvej 59, Aabyhoj (postgirokontoret No. 59062) 8 kr.
- Finnlando.** Kdo Esko MANTYNEN, Kymmentie 60 as. 19, Helsinki. P. (ĝiro 9539) 200 fmk.
- Francio de S.A.T.** 67 av. Gambetta, Paris 20 poŝta konto No. 1234-22-Paris) 200 f.f.
- Germanio:** — por tuta Germ.: Kdo Leonhard PUFF, Am Ebelfeld 237, Frankfurt a/M. P. paunheim (16) 5 Rmk.
— aparte por la brita zono: Kdo E. SCHMIDT, Hirtenstr. 6, Dortmund (21-a) 5 Rmk.
— aparte por la usona zono: Kdo Erich TIETSCH, Schwabstr. 22, Stuttgart-W. 5 Rmk.
— aparte por la franca zono: Kdo Julius MATHES, Sternwaldstr. 5, Freiburg i/B 17-a 5 Rmk.
— aparte por la soveta zono: Kdo Paul KÖCKERITZ, Klopstockstr. 56.III, Dresden A. 29 5 Rmk.
- Hungario.** Kdo J. MODRA, Almos-u 51, Pestszenterszebet (poŝta konto No. 32.221) 8 for.*
- Italio.** Kdo Mario GUZZI, Via Modena a 33, Torino 500 lir.
- Japanio** — vakas.
- Jugoslavio.** Kdo Premuj VJEKOSLAV, M. Stanivukoviĉa 1, Osijek II 60 din.
- Meksikio.** Kdo Jozéfo SERANO, Central de Talabareros 72, Col. E. Carranza, Meksiko D.F. 5 m.p.
- Nederlando.** Kdo C. v. ESSEN, Floretstr. 10, Rotterdam-Z., poŝtkonto 86033) 3 gld.
- Norvegio.** Kdo Jorgen ROSENDAHL, Uelandsgata 63, Oslo 38 7 kr.
- Oceanio.** Kdo Aart de BES, Verzorgings Peloton 552086, T. Brigade F.M.S.S., Semarang, Java 3 gld.
- Polio.** Kdo Albin PIOTROWSKI, ul Grottgera l. m. 14, Krakow ... 200 zl.
- Portugalio:** Kdo João Frazao de FARIA, Rua José Estevao No. 26, 3º E., Lisboa 36 esk.*
- Sud-Afriko.** Kdo David DAMBE, P.O. Box 2418, Johannesburg 7½ ŝ.
- Svedio.** Kdo Justo BOBERG, Palmfeltsvägen 49, Enskede (poŝta konto No. 3815) 6 kr.

Inter la nederlandaj desegnistoj kaj karikaturoj el la komenco de la nuna jarcento okupis Albert Hahn tre gravan lokon. Li distingis sin ne nur per sia eksterordinara talento, sed ankaŭ per tio, ke li staris ĉe la flanko de la laborista klaso, ke li per sia desegno servis al ĝia batalo.

Albert Hahn naskiĝis en 1887-a en Groningen. Li vizitis la elementan lernejon kaj poste lernis dom- kaj ornampentradon. Je 14jara aĝo okazis ĉe li akcidento, pro kies sekvoj li devis rezigni pri la elektita profesio. Li decidis lerni la desegnoarton kaj vizitis por tio dum tri jaroj la lokan desegnoakademion. Post tio li povis per la helpo de unu el siaj instruistoj daŭrigi la studadon ĉe la Regna Akademio en Amsterdamo. Akirinte la diplomon mezgradan pri desegno, li estis kelkan tempon instruisto ĉe metilernejo. En 1900 Hahn aliĝis al la Social-Demokrata Laborista Partio. Kiam du jarojn poste ties ĉiutaga gazeto „Het Volk” (La Popolo) organizis konkurson pri politika desegno ankaŭ Hahn partoprenis. Lia verko estis premiata kaj tiel publikiĝis lia unua politika desegno „La monŝranko ŝirmata de Biblio kaj incensujo”.

Li fariĝis regula kunlaboranto al ĉa partia gazeto kaj restis tio ĝis lia morto.



Dum 16 jaroj aperis ĉiusemajne, escepte dum tempoj de malsano, liaj bonegaj desegnoj, en kiuj aktualaj politikaj okazaĵoj kaj faktoj estis bildigitaj en trafe karikaturo formo. Albert Hahn estis simpla homo kun granda amo por la malriĉuloj kaj subpremitoj, kun vera sindono al la afero de la laborista klaso. Ne longe li povis servi al ĝiaj idealoj. Li havis malfortan korpon kaj ofte malsano devigis lin interrompi

Svisio. Kdo Auguste BAVAUD, Charmille 30, Genève 7fr. sv.

Usono. Kdo Arthur S. KANE, 1324 Raymond Av., Glendale 1, Calif. 2.50 dol.*
*Rimarko: La kotizoj markitaj per steleto * estas provizoraj. tiuj perantoj ne ankoraŭ respondis al nia cirkulero pri la fiksado de la 1948-kotizo.*

Ne atendu pli por pagi vian kotizon 1948! Tiel vi helpos finance al la Asocio k faciligos la administradon.



sian laboron. La milito (1914—18) kun siaj teruraĵoj multe suferigis lin kaj ĝi sendube malfavore influis lian sanstaton. Li ne ĝisvivis ĝian finon; li mortis la 3-an de aŭgusto 1918-a. La saman tagon aperis en la gazeto lia lasta desegno „Kvar jaroj da milito”.

Hahn vivis en periodo de aktiva laborista batalo, en tempo kiam la gvidanta partio ankoraŭ juna kaj batalema, kvante kaj influe kreskis kaj progresis, kiam oni kredis la venkon de la proletaro ne malproksima. La laboristaro vigle agitis kontraŭ la reakcia registaro. Hahn partoprenis en tiu batalo, kaj per siaj karikaturoj daŭre kaj senkompate atakis la registarajn ĉefulojn kaj preĉipe d-ron A. Kuyper, la tiaman ministron kaj gvidanton de la t.n. kontraŭrevolucia (kristana) partio. Kvankam Hahn sendube estis internaciisto, nur malmultaj el liaj desegnoj temas pri alilandaj aŭ tutmondaj aferoj. Plejparte ili koncernas la nederlandan politikon: plena kolekto de liaj verkoj tiutemaj bildigas preskaŭ komplete la historion de la tiutempa politika batalo en Nederlando. La milito estis por Hahn granda seniluziigo. Ne nur ĉar ĝi dubigis lin pri la efektivigo (daŭrigo sur paĝo 3)

Frakcio „Klasbatalo“.

(Ni devis grave mallongigi ĉi tiun frakcian „Komunikon“, ĉar K-do J. G. L. kritikis en ĝi aliajn politikajn skolojn k tio estas precipe en Frakciaj Komunikoj ne permesata. J. G. L. legu nian regularon pri la Frakcioj en S.A.T. B. W.).

Pro forgeso de la redaktoro de S-ulo ne aperis la komunikoj de nia Frakcio post februaro.

En aŭgusto aperis n-ro 21 de nia organo „Klasbatalo“. El la enhavo ni nomu „Penso k Ago“ k „Letero el Palestino“. La kunlaboro al „Klasbatalo“ estas ankoraŭ malmulta. Oni komprenu, ke la celo de nia organo ĝuste estas akceli la liberan diskutadon inter ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la memstara liberigbatalo laborista k staras sur marksisma starpunkto.

Por tiuj k-doĵ, kiuj ankoraŭ ne konas nian starpunkton, ni klarigas ke ni nomas nin Marksistoj, ĉar ni uzas la Marks'an sciencan, kiu estas la nura scienco, kiu eksplikas kontentige la ekonomiajn leĝojn k perspektivojn.

Ni opinias ke la proletaro povos starigi novan socisistemon nur se ĝi tenos la tutan ekonomian k politikan potencon en propraj manoj. Por tio ĝi bezonas klas-konsciigi, k tiun konsciigon ĝi ĉerpu el siaj spertoj en la reala klasbatalo k el siaj studoj pri la sociaj problemoj. Ni nomas nin konsilkomunistoj, tial ke ni opinias, ke la nura demokrata k komunista organizformo en la nova socio estos la laboristara regado desuba, efektiva de la proletaro mem pere de ĝiaj uzinkomitatoj k laboristaj konsilantaroj. La laboristoj mem elektu siajn strikkomitatojn, kiuj estos la pura potenco de la laboristoj. Nia devizo estas: La liberiĝo de la laboristoj povas esti nur la verko de la laboristoj mem. K konforme ni vokas: „Proletoj ĉiulandaj, unuiĝi!“

Tiuj kiuj interesiĝas pri nia starpunkto petu provexemplerojn de la organo „Klasbatalo“ ĉe la sek.: J. G. Leereveld, Prof. van Reeslaan 4, Blarikum, Nederl.

LIBERECANA FRAKCIO EN S.A.T.

Dum la S.A.T.-kongreso stariĝis Frakcio de Liberecanaj Esperantistoj. Kvantam ni komunikos pri nia frakcio en „Sennaciulo“ estas kompreneble ke ni ne rajtas uzi la tutan organon por nia propagando. Tial ni akceptis la proponon apliki la gazeton „Senŝtatano“ tiucele. La sidejo de l' frakcio estas ĉe kam. Adriano, Koningstraat 481-v, Hago, Nederlando. Al tiu, kiu deziras konatiĝi kun nia celo, ni volonte sendos provexempleron de nia gazeto. Plie ni nepre bezonas la kunlaboron de gek-doĵ samideanaj. Ili sendu raporton pri la situacio en sia lando al ni, por ke „Senŝtatano“ estu la spegulo pri la diverslandaj liberecanaj movadoj. Laŭ la raporto de kelkaj ĉeestintoj de la frakcikunveno montriĝis ke multaj liberecanaj esperantistoj ankoraŭ ne SATaniĝis. Estas grave persvadi tiujn k-doĵn ke ilia loko estu en S.A.T.

JUNULFAKO DE S.A.T.

Kiel anoncote en la pasintaj n-oj de S-ulo, okazis dum la Kongreso en Aarhus kunveno de la junularo, celanta la fondon de junular-fako; partoprenis junuloj el pluraj landoj; Nederlando, Francio, Anglio, Danio, Svedio, Norvegio.

Oni povas bedaŭri ke la tro plena programo de la Kongreso malebligis al multaj partopreni tiun Kunvenon.

K-do **Jayer Petro** malfermas la kunvenon legante la unikan leteron ricevitan: Salutoj k deziresprimoj de la laborista Esp-junularo el Germanio. El aliaj landoj, malgraŭ niaj anoncoj en S-ulo, ni ricevis nenian proponon nek sugeston.

„Ju-Ko“, Nederlanda Junulorganizo de F.L.E., eĉ ne sendis reprezentanton sed nur observantojn, kiuj cetere ne povis esti konsiderataj kiel junuloj.

K-do **Yngve Nilson** reprezentis Svedian junularon, sed portis nenian firman proponon je ĝi — Same la gek-doĵ el Francio ne povis alporti definitivan planon pro tio ke tie ankoraŭ la movado estas ankoraŭ embria, spite kelkajn gravajn atingajojn.

La debatoj estis tre konfuzaj pro tio ke manko de antaŭa prepara diskutado en S-ulo ne ebligis al ĉiuj konsideri la problemon.

Antaŭ tiu bedaŭrinda konstato de nepreteco, K-do **Jayer** esprimis opinion ke kreado de junulfako en la kadro de S.A.T. estus iom frua entrepreno k ke oni devus prokrasti starigon de tia nova organizo ĝis kiam ĝi havos certan vivkapablon k precizajn celojn.

Aliaj gekamaradoj opiniis ke oni devas tuj fondi la fakon ĉar nur per efektiva tuj laboro oni povos starigi la unuan firman bazon, kiu ebligos poste akuratan funkciadon de nia fako.

K-do **Lentaigne** (Francio) laŭtlegis leteron pri S.A.T. misiistoj.

Sekve de la diversaj argumentoj eldiritaj, oni balotis k oni fine akceptis rezolucion laŭ kiu la junulfako ekfunkcios tuj, en la mezuro de niaj nunaj ebloj, per provizoraj landaj respondeculoj, kies adresoj sekvas.

Danio: Brita **Obsson**, Kaerholmen I-III, Kopenhago, Vanløse.

Francio: A. **Deŭaye**, 12 Av. Ledru Rollin, Paris, XII.

Nederlando: Rulof v. **Putten**, Calsinsstr. 162, Hago.

Germanio: Friedel **Bues**, Fried. Ebertstr. 9, 20 Hannover-Ricklingen.

Svedio: Yngve **Nilson**, Kamrerarvägen 14 nb, Stokholmo 37.

La plej urĝa laboro nuna estas: unuflanke grupigi ĉiujn interesitojn ĉirkaŭ la landaj respondeculoj, aliflanke elekti respondeculojn en la landoj kie tiuj ne ankoraŭ ekzistas.

La fako publikigos en la venonta numero, materialon el Germanio, kiu povos esti la unua diskuttemo.

(En la dec. numero aperos raporto de la Pacista Frakcio pri la kunveno en Aarhus. Red.).

VARBU POR S.A.T.

Ofte lamas mond-progreso pro persona intereso!

Disputis mi kun profesoro, ĉu granda estas la valoro, devige studi lingvojn mortajn Li diris: „La influojn fortajn de l' lingvoj „Greka“ kaj „Latina“ — jen nia scio origina — ja ne komprenas vi, simpluloj! Jes, grandaj estas la postuloj de tiu studo en komenco, sed..... poste venas rekompenco: ĝuplene migras la **Spirito** al Rom', Aten' per nobla mitq!" „Krom tio“, diris la edzino, „per hejm-instruo de „Latino“ enspezas mia edzo monon por pagi nian jarabonon al la kutima mondvojaĝo, ĉar pli efikas ja pejzaĝo, se oni povas korpe ĝui, en Rom', Aten' laŭ plaĉ' menui!" Ĉu vi nun estas komprenanto pri neatent' de Esperanto?!?

JOSEF BURGER (601).

(daŭrigo de paĝo 2)

de lia idealo, sed precipe ĉar laŭ lia sento ĝi estis malrespekto al la homa indo, atako al la feliĉo de la homoj. Multaj el liaj desegnoj temas pri la milito; en ili li esprimis sian indignon, sian malamon, sed ankoraŭ sian kompaton, sian kunsenton pri la sorto de ĝiaj viktimoj.

Ne ĉiam liaj desegnoj rekte rilatis al la politika vivo, ne ĉiam li uzas personojn, reprezentantojn de politika penso, kiel esprimilon. Per simpla bildo li povis elvoki la impreson pri la malindo kaj malĝusto de la nuna socio. Vidu lian „Ĝardeno de la malriĉulo“, kie la pecetoj da griza muro kaj tegmento, la malfermita fenestro el kiu la mallumo elrigardaĝ, la florpoto kun la formortanta kreskaĵo impresas multe pli ol centoj da vortoj. La samon oni povas diri pri lia „Banloko por infanoj de la malriĉuloj“, kie sur malluma korto infanoj ludas ĉe la malpura akvo de urba kanaletto. Ankoraŭ la bildo „La malplenaj ligno-ŝuetoj“ kun malriĉa, malgrasiĝinta proletinfano, kiu malĝoje rigardas sian ligno-ŝueton malplenan, kortuŝe esprimas la suferon de la senhavuloj. *)

La fakto, ke la desegnoj de Hahn estis destinitaj por represo sur gazeta papero postulis apartan, ĝis tiam nekutiman desegnoteknikon. Blanko kaj nigro superregas, malmultaj estas la nuancoj. Krom tio la moko kaj ironio devis esti kompreneblaj por simplaj homoj. Malgraŭ ĉi tiuj limigoj, la verkoj de Hahn estas unikaj en sia speco. En la historio de la nederlanda porsocialisma batalo ili daŭre okupos gravan, tute propran lokon.

(El diversaj fontoj kompilis kaj tradukis G. P. de Bruin).

Rim. La kliŝojn afable prunte donis la gazeto „De Vlam“.

*) En Nederlando estas kutimo, ke en la vespero antaŭ la tago de Sankta Nikolao (la 6-a de decembro) la infanoj metas ŝuon aŭ ligno-ŝuon ĉe la kameno, atendente, ke la Sanktuljo (reale la gepatroj) metos en ĝi sian donacon.

Laborista Universitato ĉe la 20-a Kongreso de S.A.T.

— K-do **Andreo** malfermis la Laboristan Universitaton, dimanĉe matene, je la 10-a, per paroladeto kies ekzakta titolo estas: „okaze de la 100-jara datreveno de la Manifesto de la Komunisto Partio”. La preleginto, post atentigo pri la malfacilo de la temo, avertis ke li ne pritraktos kompletan didaktan bildon pri la marksismo, sed nur reliefigos kelkajn trajtojn de tiu ismo, kiujn li opiniis malbone konataj en niaj medioj.

— La enkonduko konsistis el mallonga priskribo de la vivoj de Marks k Engels, k de la konjunkturo en 1847. Tuj poste, sekvis la unua punkto de la prelego, t.e. la efektiva servo kiun Marks k Engels faris al la laboristaro, sintezante, en unu sola tutmonda koncepto la diversajn teoriojn, kiuj regis tiam en la ĉefaj industriaj landoj k kiuj ĝuste diferencis pro la malsamaj procezoj de disvolviĝo de la ekonomio en tiuj landoj. Tiel, el la angla ekonomismo, el la franca politikismo k el la germana idealista dialektiko, ambaŭ patroj de la scienca socialismo (el inter kiuj la preleginto rifuzis dispartigi la meriton de la eltrovo) donis al la tutmonda socialismo la sintezan metodon, kiu helpas ĝin en ĝia batalo por la fina celo.

Nenia metodo (ĉar ĝi ne estas doktrino, eĉ ne sistemo) povas esti malpli dogmea, malpli religieca ol tiu, kiu akceptas kiel ĉefan bazprincipon, la dialektikon.

La dialektiko, sur kiu staras la tuta metodo, havas neniajn rilatojn kun la fama „ĉiarimedeco” aŭ kun la jezuita „retoriko”. Al la feŭda ekonomisistemo korespondis la metafiziko, k la teologia koncepto pri historio. Kiam la burĝa klaso leviĝanta bezonis ŝanĝadon en la socirilatoj ĝi starigis antaŭ si novajn demandojn k nepre bezonis novan filozofion k novan komprenon pri la historio: tiel naskiĝis la logiko kiel filozofia sistemo k la idealista koncepto pri historio. Sed nune eĉ la burĝa scienco devis forlasi tiujn arkajajn sistemojn. Despli, la laboristaro bezonas novan filozofion k novan koncepton pri la historio.

— La ĉefa karakterizo de la dialektiko estas ke ĝi rifuzas konsideri la homon ekster la naturo; por ĝi la tuta naturo (entenate la homo) estas regata de samaj leĝoj; ĉiuj fenomenoj havas interinfluojn unuj sur la aliajn k oni ne povas konsideri ian ajn fenomenon, ekster la aliaj, ne falsigante la tuton. Tiel, la marksismo, konsiderante ke la homo, regata de la universala dialektiko, sekve povas kompreni la tutan naturon, estas vere la plej homeca el ĉiuj humanismoj”. La homo devas pruvi la veron, nome la realon k la potencon de sia penso, en la praktiko. La filozofoj nur interpretis la mondon diversmaniere, sed necesas ĝin transformi” (K. M. Tezoj pri Foĵerbak).

— La kontraŭuloj de la marksismo volas ĝin prezenti kiel pure mekanikan teorion k akcentas ĝian pozicion rilate al la determinado de la ideologioj per la ekonomiaj kondiĉoj. Sed jam Engels kontraŭstaris tiun falsan komprenon k insistis pri

la fakto ke la homa spirito, ke la ideoj ludas ankaŭ gravan rolon en la procezoj. Tiu fakto, kompreneble, ne malhelpas ke tiuj ideoj, rekte aŭ tute malrekte, k kelkfoje laŭ tre malfacile rekonebla vojo, fontas el la antaŭaj produktkondiĉoj.

— Por juĝi se ideoj, se agitvortoj estas ĝustaj, oni tute ne devas ilin juĝi nur laŭ la frazeologio k nepre vidi de kia determinita stadio de la ekonomia disvolviĝo ili fontas aŭ al kia estonta stadio ili celas. Tiel la marks'a dialektiko k la historia materialismo donas al ni la ŝlosilon por juĝi la politikon de la laboristaj partioj. Ili ebligas ankaŭ al ni, studi la ekonomian burĝan situacion, ĝin interpreti k tiel adopti politikan starpunkton en plena konscio.

— K la preleginto finas uzante la konkludon mem kiun M. k E. donis, antaŭ 100 jaroj al sia propra „Manifesto Komunista”.

„La komunistoj malŝatas kaŝi siajn opiniojn k intencojn. Ili deklaras malkaŝe, ke iliaj celoj povas esti atingataj nur per la perforta renverso de ĉia ĝisnuna sociordo. Tremu la regantaj klasoj antaŭ komunista revolucio. La proletoj havas nenion en ĝi por perdi krom siaj ĉenoj. Ili havas mondon por gajni”.

„Proletoj el ĉiuj landoj, unuiĝu!”

INTERFRAKCIA DISKUTADO.

— En la kadro de la Laborista Universitato okazis la ĝenerala politika diskutkunveno. La enkonduko, kiun legis K-do **Andreo**, skizis unue la internacian situacion. Ĝi vidis ke la du grandaj mondpotencoj, Usono k Rusio, ĉiel prepariĝas por nova mondmilito. Ĝi daŭrigis dirante ke la oficialaj laboristaj partioj k sindikatoj en ĉiuj landoj ne kapablis forigi la ekspluatadsistemon, k, ke kontraŭe ili ĝin helpas, ĉiuj enviciĝante en unu el la imperiistaj blokoj. La konkludo de la enkonduko estis ke la sola solvo por la laboristaro estas la batalo per propra organizado, sen superregado de iu ajn partio, sindikato aŭ ŝtataro.

— Konforme al la regulo proponita de la O.K.K. tiu enkonduko estis diskutata en la diversaj frakcikunvenoj kiuj delegis reprezentanton por prezenti la vidpunkton de siaj samcelanoj, en la interfrakcia diskuto.

Unue, parolis la reprezentanto de la **bolŝevist-leninista frakcio**; li parte konsentis kun la enkonduko sed opiniis ke la proletaro devas nepre apogiĝi sur partieca organizo. La sovetoj havu la ekonomian potencon, sed la politikan nepre regu forta partio de la laboristaro. La fakto ke en multaj landoj la socialismo ne ekzistas, kvankam tie regas socialistaj partioj pravas nur ke tiuj t.n. laboristaj partioj ne vere reprezentas la laboristaron.

— La delegito de la **komunistema frakcio** asertis ke la konsidero k preparolo de eventuala 3-a mondmilito, konsiderata kiel certa, estas kontraŭlaborista, ĉar eniras en la plano de la burĝa propagando militcela. Li esprimis, plue, ke en Rusio, la

kapitalismon jam anstataŭis la socialismo, ke la komunistemaj K-doĵ, tial, ĉiam apogos Rusion. Li ankaŭ aldonis ke sub la devizo de batalo kontraŭ la komunismo la okcidentaj landoj ĉefe intencas subpremi la tutan laboristan movadon.

— Laŭ la delegito de la **Sennaciista Frakcio**, se oni profetas la militon ĝi nepre venos. Plie, se oni volas kritiki, oni nepre devas aktivi en aliaj movadoj. Post la lasta milito, la mastroj ja intencis rezigni pri gravaj postenoj, sed la laboristaro ne estis matura por kapti la okazon, li aldonis ke la laboristoj devas partopreni en la industrio, por tiel edukiĝi.

— La parolinto de la **Sovetkomunista Frakcio** akcentis ke la frakcio ne povas esti principe kontraŭ la perforto, ke tiu armilo, kutime nebona, povas tamen fariĝi necesa, se la kapitalistoj ĝin trudos al la laboristaro. Li plie akcentis ke ne ĉiuj strikoj utilas al la proletaro, ke la ĉefa kriterio, estas ĉu la striko estas aŭ ne decidita de la laboristoj mem sen interveno de la sindikato aŭ de la partio.

— La reprezentanto de la **Pacista Frakcio** ĉefe insistis pri la programo mem de la Pacista Frakcio. Por ĝi, la ĉefa celo de la proletaro en la nuna situacio estas la batalo kontraŭ la milito. Tiucele, oni devas eduki la proletojn, k nur tiel sukcesos eviti la venontan militon. La grega instinkto estas la ĉefa kaŭzo de la milito k la rolo de la P. F. estas eduki la homon por ke ĝi sukcesu transpasi tiun stadion.

— La **Liberecana Frakcio** ne sendis K-don.

— K-do v. d. **Starre**, poste rimarkigis ke multaj proletoj kondutas kapitalistece, k eĉ kapitalistece k. i. a. laboras en armilfabrikoj. Unue, la laboristoj agu laboristece.

— Post tiu interesa komparado de la diversaj vidpunktoj, la K-do kiu legis la enkondukon fine konkludis: pro la diverseco de la tendencoj esprimitaj, k ankaŭ pro la precizo de la parolintoj, ĉiu aŭskultinto povis mem trafi konkludon. Li nur aldonis, en sia propra nomo, kelkajn pliajn precizojn pri la ne-laboristeca karaktero de la usona sindikataro k la rolo de la tujaj postuloj por la laboristaro.

Fine, li eldiris sian pozicion pri la rolo de esp-o: grava helpilo por la disvolviĝo de la mondo al senklasa, do senŝtata k sennacia socio.

Post tio, K-do **Paul Thorsen**, pro la neblo prezenti superpartiecan enkondukon, proponis ke dum la venontaj kongresoj, ĉiu frakcio, laŭvice, prezentu k defendu tiun enkondukon. Nenia voĉdono okazis pri tiu punkto, sed ŝajnas ke ĉiu povas ĝin akcepti, pro ĝia racieco.

PRELEGO DE K-INO SIMONE GLODEAU

Esperanto rilate la aliajn artefaritajn lingvojn k Esperanto rilate la naciajn lingvojn.

El la multenombraj projektoj (pluraj centoj) nur kvar havis vivkapablon pli malpli longan: Volapük k Ido kiuj jam

FURIOZIS

la banditismo I

(Nigraj tagoj ĉe la Administrejo de S.A.T. en 1933).

Ne volonte k dolore mi rememorigas min kiam, antaŭ 14 jaroj, la germana laboristaro ekpaŝis la vojon de abismo. La skismo de la laboristaro, kaŭzita de iuj partigvidantoj k ilia sekvantaro, preparis la vojon al la faŝismo. Tre bedaŭrinda estas la fakto, ke ankaŭ nia SAT-movado, kiu estis konstruita nur per idealaj fortoj, t.e. per K-doj, kiuj ofte tage k nokte laboradis k ĝojis pri la senĉesa kreskado de la movado, same suferis sub ĉi tiuj skismaj tendencoj. Oni simple ĵetis en la koton la bonan devizon de K.M.: „Proletoj de ĉiuj landoj unuigu vin”. Kio venus post ĉi tiu malunueco de la laboristaro,

mortis, Okcidental kiu nun ankoraŭ vivas, k Esperanto. K-dino Glodeau rapide diskutas la riproĉojn faritajn al Esperanto k argumentas ke pli ol Volapük, Esperanto povas evolui, pli riĉiĝi laŭ bezono, — ke la ĉefa argumento de la idistoj kontraŭ Esperanto, t.e. la supersignitaj literoj, nuligos kiam la lingvo de Zamenhof estos sufiĉe disvastigita. Tiam ĉiuj presistoj havos la necesajn litertipojn, kiel ili havas nun la litertipojn por komposti francan lingvon kun la ô, la â, danan lingvon kun la ø, hispanan lingvon kun la ñ, ĝ.

K-ino Glodeau diras kelkajn vortojn pri Basic English k pri la kvin projektoj de I.A.L.A. k asertas ke tiuj projektoj povos, eble ĝeni nian movadon sed ne endanĝerigi ĝin, ĉar Esperanto havas profundajn radikojn en la koro de la Esperantistoj. Pli ol gramatika perfekteco, la interna ideo donas al nia lingvo ideologian forton, kies potenco garantias la estonton.

En la dua parto Glodino asertas ke malgraŭ la subskribo al la Bulonja deklaro, Zamenhof, per sia vivo, per sia verko neniam akceptis konsideri Esperanton kiel nuran helplingvon. Ŝi starigas tri demandojn:

1°. Ĉu Esperanto taŭgas por fariĝi ĉiutaga lingvo? — Jes, diras unuanime la K-doj kiuj uzas ĝin en la hejmo.

2°. Ĉu estas ebla ke Esperanto anstataŭu la naciajn lingvojn? — Jes, pro la teknikaj malkovroj, pro la pli k pli oftaj mondrilaĵoj universala lingvo estas nepre bezono.

3°. Ĉu estas dezirinda? — Jes, ĉar la tutmonda kulturo disemita per la tutmonda lingvo estos multe pli vasta, multe pli valora ol la naciaj k regionaj kulturoj.

Si finfine konkludas: Eble nek vi, nek mi vidos tian belan tagon, ni estas pioniroj kiuj dediĉas siajn fortojn al la antaŭeniĝo de nia idealo, eĉ se tiu idealo devas efektiviĝi post nia malapero.

Sed ni povas esti certaj ke la naciaj lingvoj kadukiĝos kiel kadukiĝis la dialektoj k la antikvaj palacoj, k tiam la lingvo de la estonto, de la tutmonda civilizacio, tiam, Esperanto triumfos.

(En la venonta numero aperos la prelego de P.-Neergaard. Red.).

estis por ĉiu prudente pensanta homo tute klara.

Intertempe ĉiam pli k pli densiĝis la faŝistaj nuboj sur la politika horizonto. Parto de la laboristaro firme kredis, ke la batalorganizaĵoj de la laboristaj partioj atakus la faŝistojn, sed ĉi tiu kredo estis vana. La fatalo venis per paŝegoj.

La 5. 3. 33 okazis la baloto por la regna parlamento. La faŝistaj gvidantoj jam bone preparis la kampon en la parlamento mem, sed kiam oni aŭskultis la diversajn rezultatojn de la baloto, tiam al ĉiu estis tute klara, ke oni falsiĝis ilin favore al la faŝistoj. Dum la sama nokto, kiam oni publikigis la definitivan rezultaton, komenciĝis fia teroro k per tio la plej malinda tragedio de civiliza popolo. Faŝistaj batalorganizaĵoj atakis la sidejojn de lab. partioj, sindikatoj k a. organizaĵoj. Faŝistoj batis soc. dem. k kom. laboristojn. Al esperantistoj oni forŝiris la esp. insignon, opiniante, ke ĝi estas bolŝevista emblemo. Literaturon oni forbruligis. Partiaktivuloj estis arestataj. Faŝistaj junuloj venigis laboristojn el la hejmoj kun sitelo k broso, devigante ilin forskrapi la publikajn varbilojn k elektafiŝojn. K en ĉi tiu situacio la SAT-administranto laboregis en la administrejo, ĉar la tempo urĝis. Kvankam ni antaŭe jam ekspedis daŭre kestegojn k pakajojn eksterlanden, restis tamen ankoraŭ ekspedenda parteto de la literaturo. La faŝistoj ankoraŭ ne sciis pri nia administrejo k sekve ni povis preskaŭ ĉion forsendi. Tiutempe mi estis sola en la adm., sed per la helpo de mia filino L. ni povis ĉion glate organizi. Ĝusta estis mia supozo, ke la faŝistoj nun havas multan laboron por detruigi la ĉiujn organizaĵojn k pli poste okupos sin per nia adm.

Post certa tempo miaj najbaroj avertis min, ke mi estas prispionata k ke mi estu singarda. La bona reputacio, kiun mi ĝuis ĉe miaj najbaroj multe helpis al mi prokrasti la malagraban viziton de „Gestapo” (sekreta ŝtatpolico).

La tempo pasis k la atendata vizito ne venis. Intertempe mi enviciĝis en la grandan armeon de la senlaboruloj. Tiam estis sep milionoj registritaj. Multaj sendormaj noktoj, ĉagreno k zorgoj streĉis mian nervaron. Plej kortuŝe mi sentis la interrompon kun mia plej amataj SAT- k esp. movadoj, al kiuj mi dediĉis parton de mia vivo. Mi kvazaŭ image vivis en granda karcero kun fermitaj fenestroj. Ĉiuj fadejoj kun eksterlandaj K-doj estis rompita. En laboroficejo oni bone konis min k ne peris al mi laboron, ĉar mi troviĝis kiel „ruĝulo” sur la t. n. „nigra listo”. Tiu ĉi tediga stato daŭradis preskaŭ kvin jarojn.

Post longa, necerta atendado, komence de nov. 1933, venis la unua vizito de du „Gestap”-anoj k traserĉis mian loĝejon. Oni konfiskis multajn librojn el mia privata biblioteko, disŝiris fotojn neplaĉantaj al ili. Unu diris al mi: „ke la germana laboristo ne pensu internaciece, sed naciece”; se li estus sciinta, ke mi eĉ pensis sennaciece, tiam li certe estus konfiskinta mian tutan bibliotekon, kion li intencis fari. Poste mi eksciis, ke oni vizitis ĉiujn SAT-anojn en L. laŭ ricevita SAT-jarlibro el la „Germ. Esp. Instituto”. De ĉi

tiu tempo la polico multe interesiĝis pri mi k nia SAT-movado. Sekvis denova traserĉo k konfisko. La financoficejo ankaŭ interesiĝis pri miaj poŝtĉekaj kontoj en eksterlando, kiuj jam estis likviditaj. Laŭvice venis la invitkartoj, per kiuj oni petis informojn. Ankaŭ la policprezidejo ne mankis. Trifoje oni vokis min tien por esplori. Tie mi jam estis konata. La unuan k duan fojojn la esploro estis pli malpli severa, sed la trian fojon ĝi estis tre severa k krome interesa. Tiu ĉi oficisto de la „Gestapo” severtone demandis pri k ĉiam provis per intrigo peli min al kaptilo. Sed mia defendo estis objektiva k firma. Preskaŭ du horojn daŭris ĉi tiu komedio k mi koncize citu ĉi tiun dialogon, kiu okazis la 15. 12. 33:

O.: Ĉu vi estas s-ro L., administranto de „Sennacia Asocio Tutmonda”?

L.: Jes! Mi estis administranto.

O.: Indiferente, ĉu vi estas aŭ estis. Vi sciu, ke vi propravole ekŝiĝis el la germana nacio!

L.: Permesu ĝustigon pri la titolo de nia asocio.

O.: Rakontu, sed diru la veron, aliel vi tuj restas ĉi tie!

L.: La titolo de nia asocio ne estas „Sennacia Asocio Tutmonda”, sed „Sennacieca Asocio Tutmonda”, sekve, la sufikso „ec” donas tute alian sencon al la asocio. Ĝuste tradukita estas la titolo de nia asocio germanlingve: „Weltbund nationsloser Eigenschaften”, k ĉi tiu difino estas ĝusta. Esperanto ne apartenas al iu nacio, sed al ĉiuj homoj de la mondo.

O.: Ĉu vi konas Lanti persone? (Mi miris, ke Lanti estis tie bone konata; ĉu eble la francaj k germ. faŝistoj jam laboris man-en-mane).

L.: Jes, li estas tre klara, honesta k ĝentila homo.

O.: Kial vi ne transdonis la tutan Adm. al la polico, kiam Hitler transprenis la potencon?

L.: Mi estis nur dungito de nia organizo kiel ĉiu alia dungito ĉe iu privata entrepreno k kiel honesta homo mi nur plenumis la reciproke faritan kontrakton. Cetere, la likvido de la Adm. jam komenciĝis pasintan aŭtunon. La kaŭzo estis la skismo k malbona financa situacio. (Ĉar li ne atingis iun konkretan motivon por aresti min, li intrigis aliel).

O.: Ĉu vi konas vian membron E. (matrikulo 37,?)

L.: Jes! (Mi sciis, ke li estis arestita).

O.: Li diris, ke vi sendis nur en majo 1933 la sliparon al Parizo.

L.: Tio ne povas esti. E. venis nur unufoje dum la jaro al la Adm. por pagisian kōtizon k la lastan fojon li vizitis nin antaŭ decembro 1932. Cetere, la sliparo estis sendita jam en januaro 1933 al Parizo. Se E. tion diris, tiam li konscie mensogis. (Tamen mi tuj rimarkis, ke la oficisto intrigis, ĉar mi estis tute konvinkita, ke E. neniam estus dirinta tion.)

O.: Ĉu vi verkis politikajn artikolojn por via gazeto? aŭ ĉu vi verkis aliajn artikolojn?

L.: Ne, mi ne havas kapablon en ĉi tiu fakto. Mi nur faris miajn adm. notojn k raportojn. (Daŭrigo sur paĝo 8)

LEĜA PARAGRAFO

En la Nederlanda leĝaro troviĝas paragrafo, kiu malpermesas:

1. La publikan montradon de ĉiuj rimedoj por eviti gravediĝon.
2. La publikan aŭ nepetitan proponadon de tiuj rimedoj aŭ servoj.
3. La publikan aŭ nepetitan disdonadon de iu ajn verkaĵo favore al la evitado de gravediĝo.

Pro tiu leĝa paragrafo ne eblas grand-skale disdoni literaturon pri la konscia difinado de la infannombro kaj la batalo kontraŭ la abortigado fariĝas pro ĝi tre malfacila.

Regas en Nederlando en iuj medioj la fatala ideologio, ke la seksa pasio nepre estu ligita al la multobligado, kaj ke fakte ĉiu sekskuniĝo, kiu ne celas tiun multobligadon, estas malĉastaĵo. Sed esence la multobligado estas nur iu funkcio de la seksa pasio, kaj tiu lasta ludas en la homa organismo multe pli vastan, pli grandan kaj pli ampleksan rolon. La kontentigado al tiu tre elementa pasio estas por milionoj da homoj preskaŭ nebla, tial ke gravediĝo por ili en tiu momento ne estas dezirinda.

Nomita paragrafo malebligas klarigi al la homoj, ke la kontentigado al ilia seksa pasio estas nepre necesa por la disvolviĝo de ilia tuta personeco, ke ĝi sentime povas okazi inter homoj kun sufiĉe da respondecento kaj ke tute eblas sendanĝere eviti gravediĝon ĉe ĉiu sekskuniĝo. Se la larĝaj tavoloj de la popolo scius tion (eble oni devas diri: rajtus scii tion), ankaŭ por ili la vivo estus multe pli harmonia kaj feliĉa.

Generale oni ne trovas grandajn familiojn ĉe intelektuloj. Ĉe tiuj jam enpenetris scio kaj respondecento; ĉe tiuj ekzistas memkontrolo kaj la inklino mem difini la nombron da infanoj kaj ne lasi tion al la blinda hazardo.

Sed ĉe la amaso, ĉe tiuj, kiuj pro ekonomiaj cirkonstancoj staras sur la malsupraj ŝtupoj de la socia ŝtuparo, kaj por kiuj la vivo estas grandparte ĉiutaga batalo por la akirado de la plej elementaj porvivaĵoj, mankas tiu scio. Ĉe multaj el tiuj kreskadas la infannombro sen kontrolo kaj tie la malfacilaĵoj daŭre pliintensigas.

Al tiuj oni devus povi sin direkti por instrui al ili la benojn de la moderna tekniko, kiu ebligas meti la tutan am-vivon sur pli altan planon, liberigantan ĝin de ĉiu timo koncerne la estontecon. Ĉar kio plenis tiujn homojn, tio estas daŭra timo, ke sekskuniĝo ree kaŭzos novan gravediĝon, aŭ devigas ilin serĉi la plej fatalajn metodojn por liberigi sin de nedezirinda naskiĝo. Ĉu ne ĉiujare miloj da virinoj viktimiĝas pro nespertaj, danĝeraj kaj nerespondecaj abortigistoj? Nur ĝisfunda disvastigo de scio pri metodoj per kiuj gravedigo povas esti evitata, estas ĝusta rimedo kontraŭ la katastrofoj, kaŭzataj de la krimeca abortigado.

La nomita paragrafo malebligas grand-skale disvastigi la necesan scion inter la plej malriĉaj popolgrupoj. Ne eblas ĝene-

Ankorau

pri la facileco de Esp-o

De J. Régulo Pérez
(Kanariaj insuloj)

Kun granda intereso, mi legis la artikolojn de M. de Waard kaj P. Moth, en la februara kaj julia numeroj, 1947, de *Sennaciulo*. Mi ne emas polemiki kun P. Moth, sed kiel praktika esperantisto kaj ano de senakuzativa lingvo — mi estas hispanlingvano —, jen kelkaj faktoj, kiujn mi spertis en mia profesia vivo (mi estas docento pri la klasikaj lingvoj latina kaj greka):

Por la studado de la klasikaj lingvoj, estas foje bezonaj tre delikataj kaj subtilaj gramatikaj distingo — almenaŭ ili ŝajnas al mi tiaj, eble pro mia denaska senkaza lingveco —, ekzemple, tiuj inter kazoj gramatikaj aŭ abstraktaj kaj kazoj konkretaj aŭ lokaj. Generale, la hispanaj universitatanoj forlasas la liceojn kun tre konfuzaj kaj rudimentaj gramatikaj ideoj, kaj kiam ili iom scias fremdajn lingvojn tiuj plej ofte estas la franca aŭ la angla, ankaŭ senkazaj lingvoj.

Distingojn teoriajn, kiel la diritaj, oni ne facile komprenigas klare: tion mi spertis tre ofte. Ja temas pri kvazaŭa klarigo de kolora kamparo al denaska blindulo. Tamen la lerno de la greka kaj latina lingvoj estas necesa, eĉ al multaj proletidoj,

rala domvizitado, nek la disdonado de simplaj cirkuleroj, kiuj informas pri la rimedoj por la difinado de la infannombro. Precipe ĉe tiuj homgrupoj la servoj de la konsilaj oficejoj devus esti proponataj sen antaŭa petado.

Kiuj respondecas pri la mizero kaj danĝero de la abortigado? Certe estas ankaŭ tiuj, kiuj faras leĝojn, per kiuj la disvastigado de supre nomita scio estas ĝenata; estas tiuj, kiuj subtenas tiujn leĝojn kaj tiuj, kiuj ne komprenas, ke tiaj leĝoj estas kontraŭstarindaj. Ĉi ĉiuj estas respondecaj pri la granda ĉagreno kaj malfeliĉo, kio sekvas el tio.

Fariĝas tempo ke oni komprenu, ke ĉiu homo rajtu mem decidi kiom da infanoj li deziras kaj kiam. La nomita paragrafo elspiras la spiriton de la pasinteco, en kiu la ŝtato kaj la religia ideologio plene decidis pri la vivado de la homoj, por kiuj la sciado de multaj aferoj ne estis permesata. Ĝi malebligas, ke la homoj komencos vivi en la lumo de la racio kaj ke ili akiros iom pli da feliĉo en la malfacila ekzistado. Tial estas por ni ne facile kompreneble, ke progresemaj partioj politikaj neglektas la batalon kontraŭ tiu malmorala paragrafo.

Ni kredas, ke hodiaŭ la premisoj ekzistas por fondi movadon, kiu batalos por la realigo de raciaj konceptoj koncerne la seksan vivon, kaj unu el ĝiaj taskoj sendube estos la batalo kontraŭ leĝoj, kia la ĉi tie traktita.

V. O.

(Ni scivolas ĉu alilande ekzistas sam-specaj malpermesoj k ĉu funkcias asocioj por seksa konsilado k.t.p. B. W.).

almenaŭ dum daŭras la nuna aranĝo de preskaŭ ĉiuj mezaj studplanoj en granda plimulto de tutmondaj landoj.

Mi intruis Esperanton al kelkaj personoj, kiuj poste estis ankaŭ miaj lernantoj de klasikaj lingvoj. Kaj mi povis konstati, ke por Esperanto-sciantoj estas ĉiam multe pli facile ekkompreni la klasikan uzon de frazoj laŭ la tipo de: **mi amas la florojn** (gramatika akuzativo), **mi iras en la lernejon** (konkreta akuzativo) kaj **mi iras Romon** (samtempe gramatika kaj konkreta akuzativo), per Esperantaj ŝablonoj similaj al la citataj, ol per ĉiuj hispanaj ĉirkaŭfrazoj, eĉ se ili bone scias ankaŭ la francan aŭ la anglan (1). Kaj unu fojon intuinte la teorion pri la akuzativo, estas jam facile trovi la vojon al similaj okazoj rilate genitivon, dativon, ktp. — Samon mi spertis pri aliaj gramatikaĵoj — kie Esperanto montriĝis mia plej bona perilo —, kiaj, ekzemple, ĉe objektaj aŭ atribujaj predikativoj, laŭ la modelo de: **mi vidas la knabon ludi**, **mi trovas la vinon bona**, **oni nomis lin fripono**.

Koncerne la lernon de la Esperanta akuzativo, efektive ekestas komence kelkaj malfacilaĵoj por multaj personoj de senkazaj lingvoj. Sed la akiro de la plena teorio ja valoras la penon. Mi kredas, ke neniu alia lingvo, per tiel malmulta klopodo, donas tiel gravan kaj netan lingvan bazon por posta studado de aliaj lingvoj, kiel Esperanto. Nu, se Esperanto estus senkaza lingvo, perdiĝus ja tiu avantaĝo.

La opinio de P. Moth pri la **Plena Gramatiko** de Kalocsay-Waringhien ŝajnas al mi iom ekskluziva kaj absurda. **Detalajn** gramatikojn pri franca, hispana aŭ germana lingvoj mi ofte devis manumi, kaj preskaŭ ĉiam mi konstatis, aŭ ke ili ne kongruas kun la fakta uzo de la lingvo, aŭ ke ili estas **malmulte detalaj**. Pri neniu lingvo mi posedas, ĝis hodiaŭ, tiel bonan gramatikon, kiel tiu de K.-W. pri Esperanto. La por Moth „terura libro” ne estas aliaĵo ol klasigo, nomado kaj muntado de tiu esprima sistemo, kiun ni ĉiutage uzas, tute nature, kiel multaj personoj parolas kongrue kaj logike kaj scias nenion pri la **Logiko** de Aristotelo. En Esperanto eble oni povus agi same; sed tiam ni rezignu serĉi la klarigojn kaj pravigojn de niaj lingvaj uzoj, kaj prefere ni restu kiel tiu feliĉa homo, kiu verkadis proze, sen sia propra scio.....

Pri unu afero mi estas tute kontenta: pri la **Noto de l' Red.** al la artikolo de P. Moth. Ĝi estas unu el la plej rimarkindaj eldiroj kaj pravigoj de vere demokrata lingvouzo, kiujn mi legis ĝis hodiaŭ. Sinceran gratulon, kaj fosadu la sulkon!

(1) *Se iu kamarado deziras informiĝi pli funde kaj serioze pri la teorio de la kazoj, konsultu:*

H. Hjemslev, *La catégorie des cas. Etude de grammatie générale, I: Acta Jutlandica VII, I Aarhus Universitesforl (1935), 184; kaj*

G. Guillaume, *Esquisse d'une théorie psychologique de la déclinaison. Acta linguistica, Revue Internationale de linguistique structurale, Copenhague, I (1939), 167—178.*

Vivo kaj verko de Karl Marks

Marksismo ne estas gracie enpakita en la „kapitalo” k speciale ne nur en la unua volumo, kiun legas la plej multaj homoj. La teorioj de Marks pri historio, politiko k revolucio estas dissemataj tra la skribaĵoj de 40 jaroj. Estas malfacile sekvi kelkajn argumentadojn, speciale por tiuj ne enpenigitaj en la grandiozaj k mistikaj aspektoj de germana filozofio. Kelkfoje la argumentado en unu verko kontraŭdiras parte tiujn en aliaj. Inter la junulo k la matura viro estas kelkaj akraj pens-diferencoj. Sed, ĉefa konkludo de Marks, liaj fundamentaj principoj, estas tute klaraj.

Marks nomis sian teorion historia materialismo. Estis la apliko al historio, kiun Engels nomis „dialektika materialismo”. De Hegel ambaŭ prunteprenis la koncepton, ke ĉio en la mondo estas en konstanta fluo: io nova evoluiĝas ĉiam, io malnova formortas. K ju pli frue ĉio tio ŝanĝiĝas, des pli bone estas. Progreso estas por la avantaĝo. Progreson oni atingas per tio, kion Hegel nomis la dialektiko: unu forto (tezo) estas kontraŭata per alia (anti-tezo), kiu fendiĝis de ĝi, k de ilia konflikto rezultiĝas sintenzo enhavanta la plej bonajn elementojn de ambaŭ. Kiam la kunigo estas kompleta, la nova iom post iom fariĝas malnova k la procezo ripetiĝas.

Tamen Hegel kredis, ke ĉi-tiu progreso reprezentas la ellaboron de Absoluta Ideo en la universo, Mond-spirito esprimiĝanta tra homa konscienco. Marks turnis ĉi-tiun filozofian idealismon por produkti sian propran specon de materialismo. Laŭ lia opinio la penso k aktiveco de iu ajn socio, — ĝiaj leĝoj, politiko, religio, moralo, — elkreskas unue el la materiaj kondiĉoj de ĝia vivo, ĉefe de ĝiaj manieroj de produktado k interŝanĝo. Per aliaj vortoj, homoj ne manipulas sian ekonomion laŭ siaj ideoj pri vero k justeco, sed eltiras ideojn pri vero k justeco grandparte laŭ la speco de sia ekonomio.

Laŭ la marka dialektiko, manieroj de produktado k interŝanĝo ŝanĝiĝas konstante kun la malĝovo de novaj teknikoj k instrumentoj k helpfontoj. Dume, homoj evoluigas novajn ideojn de vero k justeco por alĝustigi siajn novajn cirkonstancojn, k senevite ĉi-tiuj, kiuj suferas pro la ŝanĝo, ribelas kontraŭ la ekzistanta socia ordo. „La historio de la tuta ekzistanta socio asertis la kunularo en la Komunista Ma-

III

nifesto”, estas..... la historio de klasbataloj. Libera homo k sklavo, patriciano k plebejano, lordo k servutulo, gildomastro k laboristo, per unu vorto, subpremanto k subpremitoj, staris en akra opozicio unu kontraŭ la alia. Ili kontinuus konstantan militon.”

En kapitalo, Marks celas montri kiel la kapitalismo (tezo) devas senevite, per siaj propraj internaj leĝoj, fariĝi tiel forte netolerebla al la proletaro, ke ĝi kaŭzas revolton kontraŭ la kapitalisto (anti-tezo) k senklasan socion (sintezo). Laŭ lia traktato: a). la plej multaj de la mond-zorgoj ekestis pro la ekspluato de klaso per klaso; b): la evoluo de la laborista klaso nuligus la klasojn, farante de ĉiu homo produktanton; c). nuligo de privata propraĵo en la produkto-rimedo signifus, ke neniu havus ion, per kio li povus ekspluati iun ajn.

Por esti certa, li antaŭdiris ke post la revolucio, dume komunismo ekestis el la utero de la kapitalismo en longa k doloriga naskokonvulsio, estus politika transir-periodo deziranta revolucian diktatorcon de la proletaro k konsiderinda malegaleco de viv-kondiĉoj. Sed post sufiĉa eduko k organizado, la ne pli longe necesa ŝtato „malaperus”, ĉiu vivus en paco k abundo en socio dediĉita al „la plena k libera evoluo de ĉiu individuo,” sub la signa vorto: „De ĉiu laŭ lia kapableco, al ĉiu laŭ liaj bezonoj!”

Ĉi tiu vizio, la finrezulto de la kontinua progreso certigita per la dialektiko, estas al preskaŭ ĉiuj marksistoj ne nur espero sed „certeco”. Ĉar al ili, kiel al Marks, dialektika materialismo ne estas filozofio, sed scienco, scienco de socio komparebla en ekzakteco al scienco de biologio. Fakte, Marks imagis sin kiel la Darwin de la sociaj sciencoj.

Klarigante kial kapitalismo entenas la semon de sia propra detruo, Marks komencis per la teorio, ke laboro estas la fonto de ĉiu valoro. K post tio li evoluigas sian teorion de plus-valoro, la kronon de sia ekonomia filozofio.

Laŭ ĉi tiu vidpunkto, ĉiu laboristo uzas nur frakcion de siaj labor-horoj por gajni sian salajron. La reston de la tago li laboras por nenio. De ĉi tiu nepagita laboro venas ĉiuj profitoj. Tiel Marks venis al sia bildo de socio: armeo de senutilaj kapitalistoj k bienistoj rabantaj de laboristoj la fruktojn de ilia laboro.

Ĉiu kapitalisto, li argumentis, senevite provas forŝiri de siaj laboristoj tiom multe da pluso-valoro, kiom li povas; eĉ se li estas humana, liaj konkurencantoj devigas lin ekspluati. Unue li simple laborigas siajn salajrulojn dum pli longaj horoj. Kiam la leĝo malpermesas tion, aŭ kiam la kapitalisto konstatas, ke tio reduktas la laborkapablon, li mallongigas la horojn, sed enkondukas la plirapidigon k streĉon por laborigi siajn salajrulojn pli rapide k pli malfacile.

La kapitalisto aĉetas ankaŭ pli k pli

kvante k pli bonan maŝinaron. Ĉi tiu pli grandigas la produktivecon de ĉiu laboristo. K kun la pligrandigo de produktiveco la kapitalista sistemo povas malaltigi la prezon de la varoj deziritaj, por vivteni laboristojn k iliajn infanojn, k tiel malaltigi salajrojn.

Maŝinaro produktas ankaŭ teknologian senlaborecon. Krome kapitalismo bezonas larĝan senlaboran „industrian rezerv-armeon” por la tempoj, kiam ĝi subite volas ĵeti la ĝiajn nombrojn de sia superflua pleno en novajn industriojn aŭ en malnovajn kies merkatoj subite etendiĝas.

Fine venas la plej bona de la malbonaĵoj de kapitalismo: la perioda reveno de ekonomiaj krizoj. Marks pensis, ke la unua kaŭzo de tiuj krizoj estas absoluta troa produktado, rezultanta de la nesatigebla impulso de la ekspansiiganta kapitalo trovi profiton k la devigo je investita kapitalo produkti, neatentante la demandon, en la malesperiga peno por konserviĝi.

Marks antaŭdiris la tendencon de kapitalismo kontraŭ koncentrigo k monopolon. „Unu kapitalisto”, li observis, „ĉiam mortigas multajn”. Li antaŭdiris la efektivan malaperon de la meza klaso, kiam unu ruinita kapitalisto post la alia neatendite venis al la proletaro. Li kredis ke la fino venos kiam areto de grandaj kapitalistoj frunt-al-frunte kun proletara plimulto, disciplinita k unuigita per devigita kunigo en grandaj industrioj pelitaj al malespero pro longa krizo ekonomia.

Ankaŭ dum tiu tempo, kapitalismo atingus sian plej altan evoluon, kiel Marks pensis; ĝia centralizo k produktiveco estas je la pinto de matureco por oportuna ŝirpreno fare de la proletaro.

Por Marks ne estis diferenco, ĉu kapitalistoj estas bonaj aŭ malbonaj: ili estas pelataj de fortoj, kiujn ili nek kontrolas nek komprenas. La akuzo de „kapitalo” pri ne-humaneco de la kapitalista sistemo restas, spite de la jarcentaj reformoj, provoko al la konscienco de ĉiu kredulo je tiu-ĉi sistemo.

Ne opoziciante la postulojn de la laboristoj je reformoj, Marks havis nenion krom malestimo por la „ekonomistoj, filantropoj, plibonigantoj de la kondiĉoj de la laborista klaso, organizantoj de bonfaro, membroj de societoj por la malebligo de krueleco kontraŭ bestoj, abstinenc-fanatikuloj, kiuj serĉas forigi la malbonojn en la kapitalismo k kuraci ĝiajn vundojn. Laŭ lia opinio ili kontraŭas nur malindulgan dialektikon, celante apogi la malnovajn anstataŭ bonvenigi la novaĵon. Ne estas grave kiom multe pliboniĝos la sorto de la laboristoj, fina kompromiso ja ne eblas: la klasa milito devas esti finbatalata. La fino devas esti „revolucia ŝanĝo en la tuta strukturo de socio”.

D-ro A. MILDWURF.

(La fino sekvos).

Ĉiu serioza esperantisto posedas **PLENA VORTARO-n**, kiu majstre klarigas al vi la signifojn de ĉiuj vortoj, kiu per multnombraj ekzemploj sciigas al vi kiel famaj esp-istoj manipulas tiujn vortojn, unuvorte, kiu donas al vi firman bazon nepre necesan ĉe la uzado de Esperanto.

Estas vera feliĉo por Esperantio, ke tiu grava libro ree estas aĉetebla. **S.A.T.-anoj ricevas rabaton de 20 %.** Perantoj, vi kolektu la mendojn!

GRAVA! Dum la kongreso malaperis la manuskripto de la traduko Roza Luksemburg. Kiu trovis aŭ kiu povas nin informi? Ni insiste petas vian helpon. **B.W.**

„La antaŭan jaron mia edzino regalis min per kelkaj **ESPERANTO-LIBROJ**. Mi esperas, ke ŝi nun ree faros tion.”

Jes, oni petu librojn por la venontaj festotagoj aŭ vi regalu vin mem!

Ĉu vi jam posedas:

PLENA VORTARO (vidu la detalan anoncon en la aŭg-septembra numero).

PATROJ kaj FILOJ de Turgenjev, prezo 2,90 gld.

JIMI HIGGENS de Sinclair, prezo 1,50 gld.

LETEROJ de LANTI, prezo 2,— gld.

LA SENLINGVULO de Korolenko, prezo 2,90 gld.

SKIZO de EKONOMIA GEOGRAFO, prezo 2,— gld.

NEGULINO por infanoj k plenkreskuloj, prezo 1,50 gld.

NACIIISMO de LANTI, prezo 0,90 gld.

HOMOJ EN MILITO de Latsko, prezo 2,90 gld.

LA BRAVA SOLDATO ŜVEJK, prezo 1,25 gld.

KULIO de Szekely Lulofs, prezo 2,90 gld.

LA PERFIDO de A. M. de Jong, prezo 2,90 gld.

Mendu ĉe **SAT**, Parizo, ĉe van Essen en R-damo aŭ ĉe via peranto. Subtenu vian organizon! Klubo pligrandiĝu sian stokon! Kontakto kun ni!

(Daŭrigo de paĝo 5)

O.: Ĉu vi ankoraŭ havas esp. korespondadon kun eksterlando? Ĉu vi ankoraŭ kunvenas en L.?

L.: Ne!

O.: Ekde hodiaŭ ni malpermesas al vi ĉiun ajn eksterlandan korespondadon k esp. interrilatojn, aliel vi portos la sekvojn. Fino! Foriru!

Poste oni ankaŭ invitis mian filinon L. al la policejo por esplori ŝin, verŝajne por kontroli, ĉu ŝiaj eldiroj koincidas kun la miaj. La 12. 5. 1934, do sufiĉe malfrue, aperis en la gazeto la publika malpermeso de nia Asocio. (90).

(Sekvas la traduko el germana de la dekreto).

Laŭ paragrafo 1, dekreto de la regnoprezidanto por ŝirmi popolon k ŝtaton, de 28. februaro 1933 (regna leĝbulteno 1, paragrafo 83) estas per tio likvidata la „Sennacieca Asocio Tutmonda”, sidejo Parizo XX

La posedajo de la nomata Asocio estas, laŭ ordono de la regna komisaro por la lando Saksio, konfiskata k metata sub la polica sekvestro. 1) Pri la konfisko de la posedajo de likviditaj k marksistaj organizoj k 2) pri polica sekvestro; ambaŭ ordonoj de 3. majo 1933 (saksa leĝbulteno, paragrafo 63).

Enoficigo de kuratoro estas provizore ne necesa.

Lajpcigo, 12.5.34.

La policprezidanto: Knofe.

KORESPONDADO

Deziras korespondi:

- K-do Friedrich Krauss, Viernheim (Hessen), Nauhäuserstr. 26, amer. zone, Germanio: tutmonde pri diversaj temoj k ankaŭ interŝ. bildkartojn poŝtmarkojn.
- K-do Paul Haselhuhn Jr., (15a) Bad Frankenhäusen/Thür., Bornstr. 19, Germanio, pri socialpolitikaj temoj.
- K-do Otto Schaub, (15a) Bad Frankenhäusen/Thür., Langestr. 42, Germanio, pri naturamiko.
- K-do C. Mailland, (16) Kasel-Ki, Hessen, Christbuchenstr. 99, Germanio, kun eksterlanduloj pri ĉiuj temoj.
- K-do Herbert Hofmann, (13b) Augsburg 3, Schisslerstr. 15/1, Germanio poŝtisto, pri diversajoj kun ĉ.l. interŝ. Pŝtm. k Pŝtk.
- K-do Aug. Sebastien, Blieskastlerpfad 10, Webenheim/Saar, Germanio, dez. kor. por kelkaj kursanoj pri medicinaj, ekonomiaj k aliaj aktualaj temoj.
- Kino Tj. Postma dez. kor. kun ĉiuj landoj. Weimansweg 50, Rotterdam-Z., Nederl.
- P. v. d. Biggelaar, A 168, Nieuw Helvoet, Nederl. dez. kor. kun geknaboj. Li mem estas 11 jara.
- 2 junaj gek-doj dez. kor. kun ĉ.l. Skribu al H. A. Knol, Hagelingerweg 61, Santpoort, Nederl.
- K-do G. de Boer, Evertsenstr. 26, Leiden, Nederl. petas kor. por siaj kursanoj k por si mem. Pri ĉiuj temoj.
- La jenaj k-doj el Ĉekoslovakio dez. kor.:
- Ottokar Kotyk, Brusnice u Trutnova. M. Louda, Zitná 49, Praha II.
- Eduard Skoda, Velká Hledsebe u Mar. Lizni, Tr. Dr. Beneše III.
- Falta Vojtěch, Smetanova 18, Brno-Zidenice.
- Nečas Rudolf, Smetanova 20, Brno-Zidenice.
- K-do Gottlieb Strössner, (13b) München 25, Dietramszellerstrasse 10/2r dez. koresp. pri ĉ. interesaj temoj, k interŝ. P. M. k il. P. K. precipe kun francoj pri franca-germana amikeco.
- La SAT-rondo de Dresden dez. grupkor. kun div. landoj pri div. temoj. Gek-oj skribu al la loka peranto Gerhard Hohlfeld, (10a) Dresden-N 6, Martin-Lutherstr. 37 III, Germanio.
- La esperantoklubo en Huskvarna aranĝos letervesperon la 15-an de okt. 1947 k ni esperas ricevi let. el ĉ. landoj. Adreso: Torsten Söderström, Sturegatan 1, Huskvarna, Svedio.
- K-do Antonio Pacheco Barbosa, rua Barbosa no. 3—3º Esq., Lisbono, Portugalio, dez. kor. kun ĉiulandaj anoj de socipolitikaj junulmovadoj.
- K-do Albrecht Liebs, Dresden-N 30, Tichatscheckstr. 11, Germanio (10a) tramisto, dez. kor. kun K-doj el ĉ.l., kiuj jam antaŭ 1933 kun li havis rilaton.
- K-do Rudolf Müller, Dresden 28, Kessendorfer str. 55, Germanio (10a), tramisto dez. kor. kun sametianoj en ĉ.l. Ĉiuj iamaj korespondantoj estas petataj sciigi la nunan adreson.

Helpo al S-ulo

La blokado de la kotizoj en multaj landoj kaŭzas al nia Asocio gravajn malfacilaĵojn; helpo al „Sennaciulo” do estas ankoraŭ nepre necesa tiom longe kiom daŭros tiu situacio. Se eblas al vi subtenu nin finance.

Ni kvitancas la jenajn donacojn:

K-inò C. v. Nieuwland, Rockanje, 10 gld; K-do Moulin, Alĝer, 25 fr.fr.; K-do Rofo 50 fr.fr.; K-do Holmgvist, Malmö, 250 fr.fr.; Cezar, Villebarou, 50 fr.fr.; Merigot, Bagnolet, 50 fr.fr.; K-do Huron, Kremlin, 40 fr.fr.; Lange, Puteaux, 20 fr.fr.

Koran dankon!

NIA POSTO

Al K-do F. P. J., Ned. Ni konfirmas ke la preparado de nia Plena Ilustrita Vortaro estas tasko giganta k malfacila, ankaŭ tre malrapide ĉar la kunverkatoj loĝas tre malproksime unu de la aliaj. La manuskripto ne estos finpreta antaŭ unu jaro, k certe alia jaro estos necesa por la kompostado, la korektado, la bindado ktp. Ni do konsilas al vi aĉeti nun la trian eldonon, nome la foto-reproduktaĵon de la dua eldono.

Komuniko pri la Jarlibro: tro optimistaj ni estis! niaj Londonaj K-doj havas malfacilojn ĉe la presejo. Ni ne ankoraŭ ricevis la tutan kompost-provaĵon. Ni povas nur esprimi la esperon ke ĝi aperos en oktobro. (Paris la 10 okt.)

Nova Marko por propagando en Brazilio k Portugalio; en portugala k esperanto; ĉiuj dediĉataj al SAT; kvin diversaj desegnoj de rfaĵa artisto; formato 34 x 42 m/m; du koloroj. Po folio da 50 markoj (10 el ĉiu speco): 52 ff. aŭ 1,20 Gld. inkluz. de la afranko.

- K-do Gustav Menges, Gleisweiler über Landan/Pfalz, Germanio, 42-jara, verkisto pri naturscienco, kulturfilmo k radio, dez. kor. kun ĉ.l. prefere el Oriento, Sud-Am., Azio k Oceanio pri naturscienco, liter. filmo k arto. Ankaŭ pŝtmk.
- K-do Herbert Demuth, Bremen 13, Pastorenweg 62, Germanio, dez. kor. kun ĉ.l.
- K-do Oscar Scheidt, (22b) Bad Kreuznach, Herlesweiden 15, Germanio, dez. seriozan kor. kun perfektaj Esperantistoj el ĉ.l.
- K-do Leonhard Frohn, (13b) München 23, Ungererstr. 57, Germanio, dez. kor. kun gek-doj el ĉ.l. pri ĉ. temoj. Kiel mallonga radioamatoro depost 1925 — miaj eks-signaloj: UOXR-OE 3 FX —, im dez. interrilati kun iuj ajn sendamatoro.
- K-do Paul Heinrich, (20a) Hildesheim, Ludwigstr. 7, Germanio, kun ĉ.l.
- K-do Heinrich Beelte, (20a) Hildesheim, Steuerwalderstr. 75, Germanio, kun ĉ.l.
- K-do Karl Eckardt, (13a) Nürnberg, Siegfriedstr. 4, Germanio, kun ĉ.l. pri sociaj temoj k politiko.